

REGULA KUNVENEJO DE UNUIĜO DE ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Aldonita de Radenko Miloĝeviĉ
06/12/2015

Komence de decembro 2015, Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (UZE) ricevis ĉiosilojn de sia estonta kunveno kiun, post multaj klopodoj, al ĉi disponigis la zagreba urba komunumo Medveĝak. La kunveno troviĝas en Radniĉki dol n-ro 1, kie UZE okazigos siajn regulajn kunvenojn kaj aliajn programojn (prelegojn, kursojn) ĉiun sabaton inter la 14h00 kaj 17h00. La kunveno troviĝas tre proksime al Zamenhofa strato kaj estas facile trame atingebla el Placo de banuso Jelaĉiĉ, la ĉefa placo de Zagrebo. Regulaj aktivecoj en la UZE-ejo komenciĝos dum januaro 2016.

Komence de decembro 2015, Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (UZE) ricevis ĉiosilojn de sia estonta kunveno kiun, post multaj klopodoj, al ĉi disponigis la zagreba urba komunumo Medveĝak. La kunveno troviĝas en Radniĉki dol n-ro 1, kie UZE okazigos siajn regulajn kunvenojn kaj aliajn programojn (prelegojn, kursojn) ĉiun sabaton inter la 14h00 kaj 17h00. La kunveno troviĝas tre proksime al Zamenhofa strato kaj estas facile trame atingebla el Placo de banuso Jelaĉiĉ, la ĉefa placo de Zagrebo. Regulaj aktivecoj en la UZE-ejo komenciĝos dum januaro 2016.

Post la malfeliĝa malfondo de la plej longdaŭra zagreba Esperanto-societo "Bude Borjan", kiu okazis la 20-an de aprilo 2011, UZE proponis, ke oni daŭre okazigu diverstemajn prelegojn kaj kunvenojn, kiel praktikis "Bude Borjan" dum 60 jaroj, sed la situacio en Zagrebo rapide malboniĝis, aparte pro la konflikto inter KEL kaj ĉiaj societoj. Kvankam en Zagrebo krom UZE ekzistas ankaŭ Esperanto-societo "Tibor Sekelj", Kroata Fervoja Esperanto-Asocio (KFEA) Studenta Esperanto-Klubo kaj Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE), kvalitaj programoj draste reduktiĝis. UZE volas reaktivigi ĉiujn esperantistojn, kiuj sentas sian respondecon pri Esperanto en Zagrebo. Havigo de propra kunveno faciligos tiun mision, kaj UZE invitas ĉiujn zagrebajn (kaj eksterzagrebajn!) esperantistojn partopreni la programojn, ĉar membreco en UZE ne estos nepre kondiĉo por tio. Bonvenas ĉiuj, kiuj volas renkonti samideanojn, prelegi aŭ aŭskulti, lerni kaj praktiki la lingvon, nepre en bona etoso.

Se vi volas regule ricevadi informojn pri planataj programoj, sendu vian konfirman retmesaĝon al:
zagreba.esperantisto@gmail.com